

Bazopilko: iom da historio kaj iom da fiziko



Heroino-herooj

Ĉarma urbo ĉe la Finna Golfo

Kiam korupto ŝoforas




MORTO De ARTiSTO

Anna Löwenstein

Juna komika aktoro, Prokulpio, estas nura sklavo, kiam li renkontas Neronon ĉe festo. La du junuloj baldaŭ amikiĝas pro sia komuna intereso pri teatro kaj la artoj. Kune ili esploras la noktan vivon kaj aliajn distraĵojn de Romo, ĝis Nerono, nur 16-jara, estas nomumita imperiestro. Kun lia subteno, Prokulpio iĝas la ĉefa organizanto de mirigaj spektakloj prezentataj al la roma publiko, inkluzive de la amasa ekzekutado de fanatika nova sekto, la kristanoj.

Kaj tamen, ne ĉiam facilas esti amiko de imperiestro...



Anna Löwenstein



MORTO De ARTiSTO

Paĝoj: 624; Formato: 135 x 205 mm

Eldonjaro: 2008

Serio Stafeto n-ro: 33

ISBN: 978-90-77066-39-3

Prezo ĉe FEL: 20,00 EUR + afranko

Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte
de Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

In-da prezidanto

Unuafoje en la historio de Litovio prezidos virino – 53-jaraĝa Dalia Grybauskaitė. En elektoj en majo, Grybauskaitė klare venkis la aliajn ses kandidatojn, ricevinte 69 % de la voĉoj. Ŝia elektiĝo klariĝas simple: ŝian personecon litovoj ligas kun pli grandaj ebloj, por ke la lando travivu la nunan krizan periodon.



10



Kreskas konfliktoj

11

Ciganoj konsistigas la plej grandan minoritaton en Hungario. Nuntempe frapas aparte ilin la ekonomia krizo: ĝenerale mankas al ili metioj aŭ aliaj okupoj.

Pro la ekonomia krizo malaltiĝas la porinfanaj subvencioj, per kiuj precipe vivas la ciganoj. Tamen ili malofte elmigras al ŝtatoj ekonomie pli favoraj. Do nepras, ke la registaro trovu solvon.

Bazopilko: iom da historio kaj iom da fiziko

25



Bazopilko estas tre populara en Usono, sed ĝi estas ludata en multaj landoj. „Besuboru” jam prosperis dum ĉirkaŭ jarcento en Japanio kaj la „homu ran” estas tiom parto de la japana kulturo, kiom sumo-luktado, kabuko kaj suŝio. Bazopilko estas ankaŭ tre populara en la pacifik-randaj orient-aziaj landoj, en Kanado kaj en Kubo, Domingo kaj la kariba regiono.

politiko

ALBANIO	8
Alta diplomatio	
ALBANIO	8
(S)eks-ministro	
ORIENTA AFRIKO	9
Konceptoj komunaj	
BURUNDO	9
Helpo transatlantika	
LITOVIO	10
In-da prezidanto	

moderna vivo

CIGANOJ	11
Kreskas konfliktoj	
KRIMADO	11
Murdo-rekordo	
NARKOTAĴOJ	11
Heroino-herooj	
BURUNDO	12
Kiam korupto ŝoforas	
LITOVIO	13
Artistoj „krucumitaj”	
INFANOJ	14
Fostofesto	
ALBANIO	14
Virino kun du patrujoj	

turismo

FINNLANDO	15
Ĉarma urbo ĉe la Finna Golfo	

spirita vivo

KOSOVO	17
Modelo de interreligia harmonieco	
KUBO	19
Frato José Olallo Valdés beata	
Vatikano diplomatie rilatas kun 177 landoj	20

novelo

La Pendantaj Ĝardenoj estis sonĝo	21
---	----

sporto

BAZOPILKO	25
Iom da historio kaj iom da fiziko	

enigmoj

Litera sudoko	26
La solvo de la libroforma enigmo de Monato 1/2009 ...	26

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› El mia vidpunkto	7
› Anoncetoj	27

kiel pagi vian abonon de monato?

► Rekto al la eldonejo ...

> Per via FEL-konto.
 > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
 > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen.
 > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brussel.
 > El Usono per ordinara usona ĉeko.
 > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validadon fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
 > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.
 > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be
 > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.
 Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	24	27	14,4	5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9	17
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5	9
Brazilo	EUR	24	27	14,4	5	9
Britio	GBP	39	42	23,4	4	7
Bulgario	EUR	26	29	15,6	5	9
Ĉeĥio	EUR	34	37	20,4	5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	40	70
Estonio	EUR	26	29	15,6	5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (or.)	EUR	46	50	27,6	5	9
Grekio	EUR	46	50	27,6	5	9
Hispanio	EUR	46	50	27,6	5	9
Hungario	HUF	6950	7750	4170	1340	2410
Irlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5	9
Israelo	EUR	42	45	25,2	5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1460
Kanado	CAD	76	80	45,6	9	15
Kipro	EUR	34	37	20,4	5	9
Koreio	EUR	42	45	25,2	5	9
Kostariko	EUR	24	27	14,4	5	9
Kroatio	EUR	26	29	15,6	5	9
Latvio	EUR	26	29	15,6	5	9
Litovio	EUR	26	29	15,6	5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5	9
Malto	EUR	34	37	20,4	5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Norvegio	NOK	398	430	238,8	45	73
Nov-Zelando	NZD	105	110	63	11	19
Pollando	PLZ	99	110	59,4	22	36
Portugalia	EUR	42	45	25,2	5	9
Rusio	EUR	24	27	14,4	5	9
Serbio	EUR	25	29	15	5	9
Slovakio	EUR	26	29	15,6	5	9
Slovenio	EUR	34	37	20,4	5	9
Sud-Afriko	EUR	42	45	25,2	5	9
Svedio	SEK	466	499	279,6	49	86
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	15
Usono	USD	78	82	46,8	8	14
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5	9

► aŭ pere de peranto ...

> **Aŭstralio:** Libroŝerbo de AEA, 4/23 Albue-
 ra Street, Battery Poooint Tas 7004, Australia.
 Reto: libroŝerbo@esperanto.org.au.
 > **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38,
 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744.
 Reto: leopold.patek@esperanto.at.
 > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijk 140,
 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43).
 Reto: financo@fel.esperanto.be.
 > **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo,
 Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia.
 Reto: bel@esperanto.org.br.
 > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio
 de Britio, Esperanto House, Station Road,
 Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST12 9DE,
 Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
 > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III.,
 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto
 de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100,
 variab. symbol por gazeto Monato: 07001.
 Reto: cea.polnický@quick.cz.
 > **Dana:** Revuŝerbo de DEA, Arne Casper,
 Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 Køben-
 havn Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45
 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
 > **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-
 93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
 > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de
 Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530
 Helsinki, Finnlando.
 Reto: eafoicejo@esperanto.fi.
 > **Franca:** Unuigo Franca por Esperanto, 4 bis,
 rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D
 Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
 > **Germanaj:**
 > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer
 Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero:
 0 420 933 400, BGN: 290 400 90)
 Reto: robo.espero@acn-mail.de.
 > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303
 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk
 91856-676 (BLZ 54510067)).
 Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang
 Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129
 Mainz.
 Reto: wolfgang.schwanzer@esperanto.de.
 > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio,
 Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de
 Pensions 2100-0461-90-0200055053).
 Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
 > **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest,
 Bakatsu. 1/3III.1. Reto: abonasoftware@gmail.com.
 > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9
 Templeogue Wood, Dublin 12.
 Reto: noviresp@eircom.net.
 > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio,
 Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík.
 Reto: esperant@ismennt.is.
 > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via
 Villorresi 38, I-20143 Milano (pĉk.:
 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
 > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto,
 Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162.
 esperanto@jei.or.jp.
 > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a
 Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington,
 Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: yan@storm.ca
 > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601

ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro
 Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860
 Rete: esperanto@saluton.net.
 > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981,
 1000 San José. Reto: miaumiaul@ice.co.cr
 > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti
 Duh 130, HR-10000 Zagreb.
 Reto: mbelosev@public.srce.hr.
 > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecības
 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371
 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
 > **Litova:** Laimius Straznickas, Laimius Straz-
 nickas, LEA, a.k. 187, LT-01003 Vilnius-C,
 Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
 > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394
 Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111
 0089 3612 0000).
 Reto: esper_lu@geocities.com.
 > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg
 176, NL-3015 BJ Rotterdam.
 Reto: uea@inter.nl.net.
 > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf
 Schous vei 18, 0572 Oslo 5.
 Reto: inform@esperanto.no.
 > **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date
 Crescent, Christchurch 8025.
 Reto: gddewar@ihug.co.nz.
 > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117
 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-
 1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV
 O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
 > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio,
 R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239
 Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
 > **Ruslandaj:**
 > Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-
 grad, ab. ja. 1248, Ruslando.
 Reto: sezonoj@gazinter.net.
 > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006
 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964.
 Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.:
 42301.810.3.0018.0084867.
 Reto: mikaelo@km.ru.
 > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića
 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel.
 +381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.yu
 > **Slovenaj:**
 > Višnja Brankovič, Via Parini 5, I-34129
 Trieste. Reto: visnja.brankovic@os.htnet.hr.
 > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130,
 HR-10000 Zagreb.
 Reto: mbelosev@public.srce.hr.
 > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview
 Crescent, Milnerton Ridge, 7441.
 Reto: beckford@telkomsa.net.
 > **Svedaj:**
 > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Espe-
 rantoförbundet, Svartviksvägen 14, S-123
 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet
 Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35
 Hörby, Svedio.
 Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn
 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7
 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito,
 CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1
 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Kia konsekvenco!

Kiel ĉiam post tia katastrofo, ankaŭ pro masakro la 11an de marto en urbeto proksime de Stuttgart (suda Germanio), kie 17-jarulo murdis 15 homojn, precipe lernantojn, politikistoj diskutis pri konsekvencoj. Post simila amoko-kuro en orienta Germanio antaŭ du jaroj oni jam diskutis pri malpermeso de pafiloj, sed la lobio de sportpafistoj, ĉasistoj kaj armilproduktistoj sukcesis malhelpi iun ajn pli severan leĝon. Nun tamen la parlamentanoj en Berlino ne plu estis haltigeblaj – tro ŝokitaj estis la civitanoj kaj politikistoj post la nova masakro fare de junulo, kiu uzis por la murdado pistolon de sia patro, sportpafisto. Kaj efektive, la parlamentanoj rekomendis kompletan malpermeson de pafiloj, inkluzive de farbopistoloj. Per ili oni povas kolore makuli homojn. Oni argumentis, ke per farbopistoloj


junuloj lernas celi kaj pafi, tiel ke ili poste povus fariĝi murdistoj. Ho jes, krome oni volas, ke estonte junuloj ne jam ekde 14, sed nur ekde la aĝo de 18 jaroj rajtos uzi mortigajn pafilojn. Kaj oni volas, ke estonte kontrolistoj rajtos sen antaŭa anonco eniri domojn de pafistoj por vidi, ĉu la mortigiloj estas laŭleĝe konservataj. Tamen, la kontroloto povos rifuzi la eniron de kontrolisto ...

La antaŭe nomita lobio do denove plene sukcesis. Malpermeson de veraj pafiloj kaj ties kontroladon oni rifuzis per la argumento, ke per tio oni metas sportpafistojn sub „ĝeneralan suspekton“, kvazaŭ ĉiu el ili estus eventuala murdisto. La leĝdonaj instancoj komprenis kaj akceptis tiun argumenton. Tio surprizas en Germanio, ĉar ĉiuj novaj sekurigaj leĝoj (faritaj precipe kontraŭ la danĝera terorismo) anticipas ĝuste tiun ĝeneralan suspekton de

ĉiuj civitanoj. La leĝdonanto evidente ekkonis, ke al sportpafistoj oni povas pli multe fidi ol al ordinarnaj civitanoj.

Estas bone sciite, ke mondvaste tiaj masakroj fare de junuloj ĉie eblis nur, ĉar iliaj patroj posedis mortigajn pafilojn. Vera konsekvenco do povas esti nur, kiel okazis ekzemple en Britio, ĝenerale malpermeso ilin. En Germanio tiuokaze oni havus nur ĉirkaŭ 3 milionojn anstataŭ nun 30 milionojn da pafiloj. Neniu ja volas, ke policianoj, soldatoj kaj ĉasistoj uzu nur bastonojn, sed por kio vere utilas absurda „sporto“ pafado? Mi tamen miras, ke krom farbopistoloj oni ne volas malpermesi ankaŭ akvopistolojn, ĉar per ili eĉ etaj infanoj jam lernas celi kaj pafi!

Sincere via



Stefan MAUL



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 30a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anoncitarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vispaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseo:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.

Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ.
Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono.
Telefono 440-646-1482.
Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio.
Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono.
Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando.
Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.
Rete: turismo@monato.net.

Tri monatoj pasis ...

Tri monatoj pasis ... kaj nenio ŝanĝiĝis post la batalhalto. Hamas plu regas Gazaon, fojfoje lanĉas raketojn, la israela kaporalo estas ankoraŭ mal-libera. La israela registaro malpermesas eniron de konstrumaterialoj, kaj nur nesufiĉa provianto povas eniri la gazaan zonon.

La gazaanoj plu suferas, pro kolektiva puno, kiu estas malpermesita de la konvencio de Ĝenevo, subskribita de Israelo. Malsanulejoj ne plu havas kuracilojn, 132 000 homoj ne plu havas hejman fluan akvon, neniu el la 4000 detruitaj domoj estas rekonstruita. Sed ĉio glatas: neniu plu preparolas la aferon. La israelaj militkrimuloj vespermanĝas kun aliaj grandaj landregantoj, preparante la sekvontan buĉadon.

Thierry TAILHADES
Francio

Daŭripova evoluo ne ekzistas

En MONATO (2009/5, p. 20) Maritza Gutiérrez donis sian opinion pri lingva ekologio. La evoluo ekpilis la homon per konscio, sciado kaj konscienco. Evidente tio ne helpas krei intersocian-intersocialan justecon kaj konservadi integran biosferon. La denaska individua kaj kolektiva memcentrismo kaj orientiĝo je ĉefe materiaj profitoj kadre de la tiel nomata novliberalismo reduktas liberecon al libereco de la kapitalo kaj ties politika kaj kultura sekurigo je kostoj de homa mizero kaj perdo de naturaj resursoj kaj de la kompensopovo de la biosfero.

La dilemo inter la justec- kaj medikrizoj tuŝas ankaŭ, kion oni povas nomi „lingva ekologio“. Depende de siaj relativaj grandoj kaj signifo, do ne-depense de siaj diversaj genetikaj kaj tipologiaj trajtoj, la tiel nomataj indiĝenaj, eble eĉ kelkaj pli „grandaj“ kaj internacie strukturitaj kaj akceptataj lingvoj certe perdiĝos kiel kromefiko de la ĝisnune ne haltigebla evoluo de la homa socio al plena forpereo. „Daŭripova evoluo“ ne ekzistas, ĉar la homo principe ne posedas la kapablon pri „daŭripova evoluigo“.

Lingvo akompanas la imperion de

kapitalo, profitoj kaj detruo. Ĉi tiu imperio sin komunikas kaj agadas per kelkaj ĉefaj lingvoj, aparte per la angla kaj ĝia ekonomia fono.

Jen nia situacio: la homa socio eble sin savos por malmulte da inda estonteeco, sed je la kostoj de esencaj partoj de siaj hereditaj opcioj. Konscio, sciado kaj konscienco evidente ne sufiĉas por ekagi nun ...

Wolfgang GUENTHER
Hispanio

OPINIO

Obamenajo, aŭ haladzo de socialisma aventurismo

Tiel historioj de la estonteco vortaj nomas la nunan tagon epokon de usona historio. Neniu, elektita antaŭ registaro, kiu ekis socialisman aventurisman. Clinton kaj Bush (la filo), sekvanse utopiege ideoj, devigis hunkojn rompi la regulojn kaj finis hipotezojn de tio, kio nek kapabla nek pluri redoni la hundojn.

Tamen en tiu artikolo temas nek pri la socialismo nek pri la usono, nek pri la ekonomia katastrofo kadre de la aventurismo de socialismanoj elin. Temas pri subdono de la lando-fundamento rezulto de anglistoj flanke de la tri branĉoj de la ŝtatestado kaj de la de ŝtatestoj (gratuloj por kvantoj) Rendi, en la prezidenta foto de Usono nun sidas ...

„Ha, jen denove kompara teorio“, ekprenas eble leganto, al kiu la amas-komunikado intencas, ke ĉi tiu, kiu prihavas la legendojn de Obama, estas abstrakta heredo (angle heritor), kiu dadas pri la valideco de la nasko-atestilo de Obama.

Ne. Utrazi estas nenio kiel al sekureco indoktrinablaj faktoj. Nur ĝenerale konati al faktoj komencas fakte esti ĉi tiu prezento.

Konstitucio

Lau la konstitucio de Usono, artikolo II, sekcio 1 (a), „oni kion hereda civitano (angle: natural born Citizen), al civitano de Usono, dum epoko de la konstitucio, rajtas okupi la postenojn de la prezidanto.“

Asteno, la partio-fundintoj certe distingas inter la necesoj „civitano“ kaj „hereda civitano“, kompreneble, ke ili ne ja ne povas esti hereda civitano.

Tamen kio pri la valideco de Obama? Lau la oficiala biografio, la biologa patro de Obama estis civitano de Kenjo (aŭ Britio), do Obama ne estas hereda civitano de Usono.

Nur pro tio li ne rajtas nek servi kiel prezidanto de Usono nek kampanji kiel kandidato.

de dame ne ekzistanta lando. Tio li rezervas la kondiĉojn de simpla civitaneco – sed nur por siaj samtempuloj.

La nocio „hereda civitaneco“ (angle: natural born) estas ne difinita en la konstitucio kiel memdevicita dum la epoko

MONATO • julio 2009

Esti usonano aŭ ne

La laŭ mi abomeninda tripaĝa polemiko de Alexander Gofen kontraŭ la usona prezidanto Obama prezentas vidpunkton de nur unu ekstrem-dekstra usonano. Jam pruvite estas, ke ne ekzistas dubo pri la civitaneco de Obama; maljustas la akuzoj, kiu troviĝas inter multaj aliaj dubindaj „faktoj“ kaj supozoj en la artikolo de Gofen.

La rubriko „Leteroj“ estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta strataдресo kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

La plimulto de la usonanoj (kaj certe la plimulto de la esperantistoj, kiujn mi konas en Usono) havas tute malan opinion pri nia nova prezidanto.

William R. HARMON
Usono

Esti usonano aŭ ne (2)

Ĉu vere gravas, ĉu Obama estas usonano aŭ kenjano aŭ eĉ senŝtatulo? Dum tiuj kelkaj monatoj, dum kiuj li estas prezidanto, li faris multe pli por Usono, ol lia „usonano“ antaŭulo Bush dum ok jaroj.

Danuta PONIAŬSKI
Usono

Pri la sama temo alvenis kelkaj pliaj leteroj. Ili aperos en la venonta numero.

Surpriza interligiteco

Surprizis min la artikolo de Sergeo Jurjiĉ en MONATO (2009/5, p. 21) pri la interligiteco de la nomo „venetoj“ kun la slavaj gentoj. Estas bone sciite, ke slavoj alvenis en okcidentan Balkanon nur ekde la 6a jarcento. Ili disbranĉiĝintaj gentoj fondis la nuntempajn sud-slavajn ŝtatojn. Tamen antaŭ ili, longe antaŭ ili, loĝis sur la tieaj teritorioj iliraj gentoj, same etruskoj kaj aliaj antikvaj popoloj parolantaj similan lingvaĵon. Ekzemple en Istrio loĝis istroj, pure ilira gento.

Mirinde, ke Sergeo klopodas inventi ian ligitecon de ili kun slavoj! Certe la nomo de Venezuelo havas rilaton al Venecio, sed neniel al rusoj! La registaro de prezidanto Chávez de Venezuelo proksimiĝis al la rusa registaro pro politikaj kaj ideologiaj kialoj, kio nun estas tute evidenta.

Bardhyl SELIMI
Albanio

Monstra atompotenco

de Stefan MAUL

Nun do ankaŭ Nord-Koreio havas ĝin, la atombombon. Definitive. En oktobro 2006 ĝi la unuan fojon testis detruigan tamen etan bombon, kaj nun, eĉ ne tri jarojn poste, la 25an de majo 2009, ĝi eksplodigis bombon multoble pli fortan, laŭ analizoj de fakuloj preskaŭ same grandan kiel la terura bombo de Hiroŝimo. Ĝian eksplodon registris eĉ sismografoj en Bavario (Germanio). Nord-Koreio do estas la naŭa atompotenco; kiom ajn terura, tamen estas fakto. Ju pli frue la internacia komunumo konscias pri tio, des pli bone. Ne havas sencon, fermi la okulojn por ne vidi la danĝeron.

Kiel povas esti, ke tiu monstra ŝtato, postlasaĵo de plej malluma stalinisma epoko, malriĉega kaj komplete (?) izolita, kapablas evoluigi kaj konstrui atombombon? Kaj per kiu mono reĝimo finansas tion, se ĝiaj civitanoj konstante malsatas kaj ne povus transvivi sen nutraĵohelpo el eksterlando? Pjongjango akiras fremdajn valutojn per vendado de drogaĵoj (ekzemple al Japanio kaj Aŭstralio), per perfekte falsitaj usonaj dolaroj kaj precipe per vendado de raketoj. Pro la raketoj laŭ seriozaj taksoj ĝi akiras sole dum tiu ĉi jaro ĉirkaŭ 1,5 miliardojn da dolaroj. Tiujn enspezojn la reĝimo tamen ne uzas por aĉeti nutraĵojn, sed por konstrui bombojn. Klientoj estas interalie Irano (ĉu baldaŭ la deka atompotenco?), Sirio, Libio, Egiptio kaj Pakistano.

Kiuj helpis?

Tamen, fakuloj supozas, ke krome ĝi ricevis helpon por sia atomprogramo de aliaj ŝtatoj. Probable meze de la 1990aj jaroj ĝi ricevis plutonion el Rusio. Konata estas intima kunlabo-

rado inter Pakistano kaj Nord-Koreio. „La komercado estis: Nord-Koreio liveras raketoteknikon al Pakistano, kaj Pakistano liveras nukleoteknologion al Nord-Koreio“, klarigas Hanns Günther [ginter] Hilpert de la fondaĵo *Scienca kaj Politika* en Berlino. Kiam antaŭ du jaroj israelaj batalaviadiloj bombardis atomreaktoron en Sirio, oni trovis tie indicojn pri kunlaborado de nord-koreoj por konstrui ĝin.

Sed Ĉinio ...

Ŝlosilan rolon en la tuta konflikto ludas Ĉinio, kiu ĝis nun neglektis ĉiujn sankciojn deciditajn de Unuiĝintaj Nacioj (UN) kontraŭ Nord-Koreio. 40 elcentoj de ĉiuj nutraĵoj kaj 70 elcentoj de fosiliaj karburaj venas tien el Ĉinio. Sen ili la granda komunisma najbaro Nord-Koreio tuj kolapsus. Anstataŭ pli izoli la reĝimon per la UN-sankcioj de 2006, Ĉinio eĉ plivastigis sian liveradon

**Kiel povas esti, ke tiu monstra ŝtato,
postlasaĵo de plej malluma stalinisma epoko,
malriĉega kaj komplete (?) izolita,
kapablas evoluigi kaj
konstrui atombombon?**

Kaj per kiu mono reĝimo finansas tion?

Neniu tamen scias, kiom granda estas la kapablo de Pjongjango konstrui bombojn. Fakuloj taksas, ke ĝi disponas pri materialo por ses ĝis ok bomboj. Ankaŭ ne estas konate, kiom da raketoj ĝi kapablas provizi per bomboj. Okcidentaj sekretservoj taksas, ke pasos ankoraŭ kelkaj jaroj, ĝis Nord-Koreio disponos pri atombombo taŭga por atakoj. Sed pli granda timo estas, ke ĝi povus vendi batalaŭgan plutonion al aliaj landoj aŭ eĉ al teroristoj.

Praktike ne eblas, vere malebligi ĉiujn kontraŭleĝajn komercojn de la komunisma ŝtato. Ke ĝi ekuzas atombombon por ataki najbaran landon, tio ne estas reala danĝero, ĉar tiuokaze la diktatora reĝimo subskribus sian propran mortkondamnon: Usono sendube ne hezitus tuj detruigi kaj ekstermi tiun monstran ŝtaton.

de varoj. Cetere, ankaŭ Sud-Koreio ne komplete ĉesigis sian helpon por la nordaj fratoj. Sed precipe, kompreneble, kulpas Ĉinio, ke Pjongjango nun glorigas sin esti la naŭa atompotenco. Dankon, Pekino!

La usona prezidanto Barack Obama anoncis, ke li volas eniri, post longa paŭzo, novan intertraktadon kun Rusio pri malmarmado de atombataliloj. Moskvo reagis pozitive, kaj la mondo do prave esperas progresojn en tiu kampo. En tia situacio oni devas ne honorigi tiun, kiu ŝokas la mondon per atombomba testo. Certe, estus terure por homoj tiel brutale subpremataj kaj torturataj per cerbolavado kiel nord-koreoj, se subite ĉesus alveni kamionoj kun nutraĵoj el Ĉinio: ili malsatmortus post mallonga tempo. Sed sole Ĉinio kapablas haltigi la frenezajn diktatorojn kaj generalojn nord-koreajn. Helpu nin, Pekino! ■

ALBANIO

Alta diplomatio



Kandidatoj por aĉeti la militistajn helikopterojn estas: la itala grupo Finmeccanica, la franca-germana Eurocopter kaj la usona entrepreno Sikorsky.



US ARMY - INCOM

La albana ministrejo pri defendado aranĝos baldaŭ konkurson por aĉeti 17 novajn militistajn helikopterojn.

Dum la monda ekonomia krizo aliancanoj de Albanio apenaŭ povas kaŝi siajn financajn interesojn. Tiel, post la membriĝo en Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo (NATO) la albana ministrejo pri defendado aranĝos baldaŭ konkurson por aĉeti 17 novajn militistajn helikopterojn.

Tuj sin prezentis almenaŭ tri kompanioj: la itala grupo *Finmeccanica* kun sia *Augusta*, filio de la firmao *EADS* kun sia franca-germana *Eurocopter* kaj la usona entrepreno *Sikorsky* kun sia

Black Hawk.

Kreskis diplomatio flanke de la koncernaj landoj por persvadi la albanan registaron aĉeti tiun aŭ alian helikopteron. Antaŭ kelkaj monatoj vizitis Tiranon italaj deputitoj; la franca prezidanto Sarkozy entuziasme akceptis la albanan ĉefministron Sali Berisha; ankaŭ usonanoj tiurilate ekaktivis. Albanio promesis disponigi al defendado ĉirkaŭ 2 % de sia landa buĝeto.

Bardhyl SELIMI

ALBANIO

(S)eks-ministro

Frumarte eksplodis en Albanio altrangula seksskandalo. Eloficiĝita estas la ministro pri kulturo kaj turismo, Ylli [ili] Pango. La ministro, laŭprofesie psikologo, invitis al sia hejmo junan juristinon, kiu petis postenon. Dum la konversacio Pango petis la virinon, iom incite vestitan, senvestiĝi.

Laŭdire la skandalo estas intence aranĝita de privata televida kanalo kadre de kampanjo por denunci koruptajn ŝtatajn altrangulojn. Malgraŭ la sukceso de la ministreco de Pango, kiu respondecis pri notinda kresko en turismo eksterlandana, kvar-minuta filmo multkanale dissendita sufiĉis al la ĉefministro Sali Berisha tuj eksigis sian ministron.

La skandalo gravas, ĉar fine de junio okazos tutlanda balotado en Albanio. Cetero Pango ne estas la unua ministro, kiu tiel elficiĝis. Jam pro seksskandaloj perdis siajn postenojn demokrata ministro pri agrokulturo kaj socialista ministro pri defendo.

Bardhyl SELIMI



Kontribuojn pri la politiko de via lando sendu al politiko@monato.net.

Konceptoj komunaj

Eniris la Orient-Afrikan Komunumon Burundo kaj Ruando. Jam membras Kenjo, Tanzanio kaj Ugando. La du novaj landoj devas multon fari por adaptiĝi al la aliaj ŝajne pliriĉaj membroj. Tiurilate Burundo ekinstruis en elementaj lernejoj la anglan kaj la svahilan lingvojn, ĉar tiuj ĉi lingvoj estas multe uzataj en la komunumo. Cetere la ministro pri transporto anoncis, ke baldaŭ ŝanĝiĝos stratkodoj por konformiĝi al la komunumo.

La koncernaj ŝtatestroj konsentis starigi komunan merkaton por varoj de la membroj-ŝtatoj. Planata estas nova ŝoseo, kiu kunligos la kvin membrojn. Nun la komunumo volas plifortigi kunlaboradon en sferoj politika, ekonomia kaj socia. Tio inkluzivos komunan valuton, kiu sekvos jam ekzistantan doganan union. Fine rezultos eble federacio de orientaj afrikaj ŝtatoj.

Jérémie SABIYUMVA



Eniris la Orient-Afrikan Komunumon Burundo kaj Ruando. Jam membras Kenjo, Tanzanio kaj Ugando.

Helpo trans-atlantika



Sovaĝe mortigita estis la vicprezidanto de la burunda kontraŭkorupta organizaĵo, Ernest Manirumva, en sia hejmo nokte inter la 8a kaj la 9a de aprilo. Samtempe malaperis gravaj dosieroj. Pro la malsukceso de la polico trovi la mortigintojn, la usona ambasadoro en Burundo, Patricia Moller, proponis la helpon de la federacia usona polico *FBI*.

Multaj homoj en Burundo opinias, ke kulpas la registaro. Jam de longe oni kredas, ke respondecas la registaro pri diversaj krimoj kontraŭ malsamopiniatoj kaj tiuj, kiuj denuncas tion, kion la aŭtoritatoj faras. Tial la ministro pri justico, Jean-Bosco Ndikumana, rapide akceptis la proponon de la ambasadoro.

Timigo, enprizonigo kaj mortominacoj fare de membroj de la nun reganta politika partio fariĝis ĉiutagaĵoj por multaj en Burundo. La interveno de la usona polico ilin esperigas. Multaj nun petas, ke la usonanoj ne limigu siajn enketojn al la murdo de Manirumva, sed priesploru aliajn kazojn, kies dosierojn la burunda polico ankoraŭ ne malfermis.

Jérémie SABIYUMVA

LITOVIO

In-da prezidanto



HTTP://EC.EUROPA.EU

En la voĉdonado por nova prezidanto partoprenis pli ol duono de la litova popolo. Ili elektis sian unuan prezidantinon, Dalia Grybauskaitė, kiu prezidos dum la venontaj kvin jaroj.

Unuafoje en la historio de Litovio prezidos virino – 53-jaraĝa Dalia Grybauskaitė. En elektoj en majo, Grybauskaitė klare venkis la aliajn ses kandidatojn, ricevinte 69 % de la voĉoj. Ŝia elektiĝo klariĝas simple: ŝian personecon litovoj ligas kun pli grandaj ebloj, por ke la lando travivu la nunan krizan periodon.

Kandidatiĝis la nova prezidanto kiel sendependulo, tamen forte apogis ŝin konservativuloj. Dum la elekto-kampanjo ŝi kritikis la antaŭan socialdemokratan registaron, agnoskante, ke ŝia tasko, kaj tiu de la nun reganta dekstra registaro, estas plifortigi la ekonomion.

Komentistoj notis, ke la elektiĝo de Grybauskaitė eble ĉesigos la nestabilan periodon en Litovio, ĉar la nova prezidanto spertas pri ekonomio kaj financoj. Antaŭ sia elekta triumfo ŝi membris en la Eŭropa Komisiono kaj respondicis pri la financoj kaj pri la buĝeto de Eŭropa Unio. Tamen ŝi volis hejmeniri por servi sian patrujon. „Mi ne povas resti eksterlande, kiam la ekonomio de Litovio suferas pro la krizo”, ŝi diris.

Salajro

Grybauskaitė promesis ekzameni la laboron de la registaro. Konate estas, ke pri la laboro de kelkaj ministroj ŝi ne kontentas. Cetere, laŭ la konstitucio, post la elektiĝo de nova prezidanto, devas demisii la antaŭa registaro. Cetere, dum la unuaj tri jaroj de sia prezidanteco, Grybauskaitė rezignos pri duono de sia salajro.

Ŝi sekvas kiel prezidanto 82-jaraĝan Valdas Adamkus, kiu finas sian duan prezidantan mandaton. Adamkus laŭtakse estis respektata, sed iom malforta gvidanto: liberala kaj aktiva en kulturaj kaj intelektaj rondoj, sed malpli efika, kiam temis pri solvado de internaj problemoj.

Laimius STRAZNICKAS

CIGANOJ

Kreskas konfliktoj



(CNN)

Ciganoj konsistigas la plej grandan minoritaton en Hungario. Nuntempe frapas aparte ilin la ekonomia krizo: ĝenerale mankas al ili metioj aŭ aliaj okupoj.

Lastatempe en sia aŭto traveturis vilaĝon instruisto. Subite antaŭ la aŭton kuris cigana knabino. Evitiĝis karambolo, kaj la knabino ne estas vundita. Tamen malgraŭ tio aperis aro da ciganoj, kiuj mortbatis la instruiston. La okazintaĵo ŝokis la hungaran publikon.

Simile, kiam rumana sportisto,

ano de elita manpilka klubo en la urbo Veszprém [vesprem], estas murdita per tranĉilo, la polico suspektis ciganojn. En alia urbo, Miskolc [miŝkolc], ariĝis ciganoj, kies konduto kreis konfliktojn. Laŭ la urba poliestro, la ciganoj ĉiel pekis, krom prirabi bankon.

Pro la ekonomia krizo malaltiĝas la porinfanaj subvencioj, per kiuj precipe vivas la ciganoj. Tamen ili malofte elmiĝas al ŝtatoj ekonomie pli favoraj. Do nepras, ke la registaro trovu solvon.

Karlo JUHÁSZ

KRIMADO

Murdo-rekordo

Ukraino, kiu perfortis kaj mortigis centon da viktimoj, estas kondamnita al dumviva enkarcerigo. Tiu ĉi „rekordo” superis tiun de fifama murdisto el la sovetia epoko, iu Ĉikatilo, kiu laŭkonfese mortigis 55 homojn. La ĵus enprizonigito, kiu laboris en miliciejo, antaŭ maldungo pro falsado, pereigis minimume 100 viktimojn inter 1984 kaj 2005. Apartaj informoj pri 40 viktimoj estis prezentataj dum la proceso.

Dmitrij CIBULEVSKIJ

NARKOTAĴOJ

Heroino-herojoj



ADAM MULLIGAN

Serbio situas sur balkana narkotaĵo-vojo kaj la polico multe laboras kontraŭ kontrabandistoj. Tiuj ne interesiĝas pri Serbio kiel merkato, simple pri la fakto, ke ĝi staras ĉe vojkruciĝo inter riĉaj eŭropaj landoj. En 2008 la serba polico agis 6 000 fojojn kaj konfiskis 1,4 tunojn da mariĥuano, 207 kilogramojn da heroino kaj 15 kilogramojn da kokaino.

Dimitrije JANIČIĆ

BURUNDO

Kiam korupto ŝoforas

En Burundo multaj reguloj ne estas observataj. Tio tuŝas ankaŭ transporton. Ŝoforoj, ekzemple, konsideras pasaĝerojn kiel fazeolojn aŭ fiŝojn, kiujn oni povas laŭvole enpaki. Prie indiferentas oficialuloj, policistoj kaj aliaj kontrolistoj.

Busetoj veturantaj al kaj el la ĉefurbo Bujumburo, aŭ aliloke en la lando, trans-

portas pasaĝerojn ne laŭ la ekzistantaj reguloj. Por ŝoforoj pli gravas enspezi, ol bonfari al pasaĝeroj. Tiel oni veturas kontraŭ granda risko, ĉar okaze de akcidentoj la asekuro-kompanioj rifuzas pagi.

Malobeco

En 2005 la novelektita registaro

promesis ĉesigi ĉi tiun manieron veturi. La popolo pli libere spiras. Rezulte, ĉiu posedanto de publika transportilo devis ambaŭflanke indiki la maksimuman permesatan nombron de pasaĝeroj. Samtempe la publiko estas petita helpi en la observado de la nova regulo kaj informi okaze de malobeco. Dungitaj estis pli da kontrolistoj, al kiuj eblis raporti, kiam ŝoforoj ignoris la limojn por siaj veturiloj.

Komence ĉio bonis kaj malmultiĝis surstrataj mortoj. Iom post iom, tamen, amikiĝis ŝoforoj kaj kontrolistoj, kiuj ekakceptis monon de la ŝoforoj, por ke tiuj akceptu kromajn pasaĝerojn. Cetere en lando, kie pli ol 60 % de la popolo kapablas nek legi nek skribi, multaj homoj ne komprenas siajn rajtojn kaj do ne plendas. Edukitaj homoj, kiuj uzas busojn, ofte estas en konflikto kun la ŝoforoj, sed pro tio, ke eĉ la polico ne intervenas, la afero iĝis kiel normala.

Sidlokoj

Do tra la tuta transporta sektoro regas korupto. Sentime ŝoforoj duobligas la nombron de pasaĝeroj, kaj trapasas la kontrolistojn. Ekzemple, en buseton kun 18 sidlokoj eblas enŝovi pli ol 30 personojn, kiuj vojaĝas en malbonaj kaj neniel sekuraj kondiĉoj.

Respondeculoj pri landa transporto maltrankviliĝas pri la reveno al iama praktiko, sed ĝis nun faris nenion por haltigi ĝin. Ankaŭ la kontrolistojn ili ne punis. Intertempe asekuristoj intertraktos nur kun tiuj, kiuj obeas la leĝon. Nun la speciala trafikpolico antaŭvidas kurson pri strata sekureco en la elementaj lernejoj. Aliaj paŝoj inkluzivas pli bone informi pri la leĝo, por ke la popolo komprenu siajn rajtojn.

Jérémie SABIYUMVA



Duoblighi la nombron de pasaĝeroj en eta aŭtobuso signifas duoblighi la profiton por koruptaj ŝoforoj.

Artistoj „krucumitaj”



„Kiam kulturo mortas, ankaŭ la ŝtato mortas”, deklaras afiŝo de protestanto.



La grupo „Krucumigata artisto” protestas kontraŭ plialtigitaj impostoj.



Protestis artistoj en majo apud la litova parlamentejo kadre de kampanjo „Adiaŭ, kulturo”. Sur ŝildoj legeblis: „Ne al drasta impostado de kulturo”, „Fiasko por litova kulturo”, „Savu litovan kulturon”, k.a. La kialo: pro fiskaj ŝanĝoj impostoj de artistoj altiĝis je pli ol 16 %.

Koleris la prezidanto de la litova artista asocio, Kornelijus Platelis: „Niaj impostoj duobliĝis kaj estonte ili daŭre kreskos. Per la honorarioj ni apenaŭ povis akiri minimuman salajron. Ĉu la registaro opinias, ke kvar miloj da artistoj de Litovio solvos la mankojn en la ŝtata buĝeto?”

Financa situacio

La litova ministro pri kulturo, Remigijus Vilkaitis, kiu spektis la protestojn, konsentis, ke kulturo malbone statas en la lando. Tamen lia opinio ne kulpas la registaro. La krizo ekzistas, laŭ la ministro, depost la ŝtata resendependiĝo en 1990. Ne helpas la monda financa situacio. „La problemo ne estas nacia sed monda”, li aldonis.

La artistoj celis reveni al la antaŭaj impostoj. Tamen la ĉefministro, Andrius Kubilius, diris, ke artistoj en tiu ĉi kriza momento devus esti solidaraj kun la tuta popolo. Laŭ li, plialtigitaj impostoj garantias ĝustatempan elpagon de pensioj.

Kultura burokratio

Fakte ne ĉiuj artistoj koleras pro pli altaj impostoj. Kelkaj rimarkis, ke precipe kulpas malperfekta financada sistemo por kulturaj aferoj. „Impostoj estas bonaj, nur la kultura burokratio, kiu grandparte eluzas la monon, estas superflua”, diris la poeto Liudvikas Jakimavičius.

La komence trankvila protesto plivigliĝis, kiam grupo de junaj artistoj prezentis sian proteston „Krucumita artisto” por montri, kiel oni mortigas litovan kulturon.

INFANOJ

Fostofesto



Flandraj rekonfostoj estas nun eksportataj al Cannes.

Paŭl PEERAERTS

La flandraj rekonfostoj ekde la somero estos troveblaj ankaŭ en la franca urbo Cannes. La inventinto de la fostoj, Dominiek Vervaecke [dominik vervake] el Oudenburg, ĵus sciigis, ke li faris interkonsenton kun la urbestro de Cannes. Ĉi-somere 18 tiaj fostoj estos videblaj sur la strando de la franca banloko.

La ideon pri rekonfostoj Vervaecke havis antaŭ 20 jaroj. Ili konsistas el alta trabo, kun sur ĝi tridimensia objekto tre facile rekonebla por infanoj, kiel ruĝa dometo aŭ flava banano. Ekde la enkonduko de la fostoj sur la flandraj strandoj, la kvanto de perditaj infanoj draste malaltiĝis, ĉar la junuletoj multe pli facile povas orientiĝi.

„Laŭlonge de la flandra marbordo jam troviĝas 137 rekonfostoj, sed ili estas uzataj ankaŭ en Venecio, Benidormo kaj en pluraj francaj banlokoj. La aldono de Cannes estas por mi kvazaŭ festo,” komentis Vervaecke.

ALBANIO

Virino kun du patrujoj

Inter 1945 kaj 1961, kiam floris amikeco inter Albanio kaj Sovetio, centoj da albanoj edziĝis al rusinoj. Tio eblis aparte post la morto de Stalin, kiam geedziĝoj tiaj iĝis laŭleĝaj en ambaŭ landoj.

Sed, kiam rompiĝis la amikaj interrilatoj, la miksitajn familiojn trafis ofte malfeliĉo. Vole-nevole paroj divorcis kaj la infanoj estis dividitaj inter la iamaj geedzoj. Ankaŭ por nedivorcintaj familioj komenciĝis malfacila vivperiodo. Multaj albanaj edzoj kaj eĉ rusaj edzinoj estis persekutitaj, arestitaj aŭ enkarcerigitaj. Kelkaj estis eĉ kondamnitaj al morto.

Sorton tian spertis la familio de Xhavit Sollaku [dĵavit solaku], juna inĝeniero, kaj Irina. La paro geedziĝis en 1954, poste naskiĝis du ĝemelinoj, Elena kaj Vera. Irina ekloĝis en Tirano, en Albanio, kie la familia vivo ĝis 1961 prosperis.

Arestita

Tiam, tamen, pro tio, ke la paro rifuzis divorci, Xhavit kaj Irina ricevis pli malaltajn laborpostenojn. Kiam du fratinoj de Xhavit provis fuĝi okcidenten, la ŝtato sendis la geedzojn provincen. En 1976 Xhavit estis arestita kaj, post pro-

ceso „malantaŭ fermitaj pordoj”, kondamnita al morto.

Tio signifis, ke liaj filinoj ne rajtis iri al universitato kaj la tri virinoj estis devigitaj vivi en fora vilaĝo, kie dum dek jaroj, zorge observataj de policistoj kaj aliaj aŭtoritatoj, ili laboris kiel terkultivistoj.

Nur en 1988 Irina rajtis reveni al Sovetio kun siaj filinoj. Tie, tamen, ŝi konis malmultajn homojn, kaj post preskaŭ 20 jaroj ŝi decidis reveni al la dua patrujo, al Albanio. Ne plu regas tie totalismo, kaj la vivnivelo sufiĉe pliboniĝis.

Bardhyl SELIMI

FINNLANDO

Ĉarma urbo ĉe la Finna Golfo

Ĉi-jare la dua plej malnova finna urbo Porvoo altiras la atenton pro jubileo. Tie antaŭ 200 jaroj kunvenis la unua Dieto de Finnlando, en kiu caro Aleksandro 1a proklamis, ke Finnlando, antaŭe parto de la sveda reĝlando, estos aneksita al la Rusia imperio kiel aŭtonoma granddukujo. La

rusa caro volis trankviligi la loĝantojn per promeso, ke la luterana religio kaj bazaj leĝoj de Finnlando ne estos ŝanĝataj. Por 50 jaroj li liberigis el militservo la finnojn, kiuj dum jar-



Situo de Porvoo



Ĝenerala vidaĵo de la malnova parto de Porvoo. Supre dekstre videblas la granda preĝejo, en kiu okazis la unua dieto de Finnlando.



La blazono de Porvoo

centoj servis en la sveda armeo. Aldone li promesis ankaŭ, ke la kolektita impostmono estos elspezata nur profite al Finnlando. Tiujn favorajn decidojn ni supozeble ŝuldas al la instruado kaj leteroj de lia longtempa svisa gubernisto La Harpe, kiu avertis lin, ke estos ege multekoste administri la aferojn de la konkerita lando.

Porvoo estis fondita ĉe la Finna Golfo en 1346 dum la sveda regado. En 1550 reĝo Gustavo Vasa ordonis, ke la porvoanoj transloĝiĝu al la ĵus fondita ĉefurbo Helsinko, kiu situas je 50 km okcidente. Ĝi estis reestablita kiel urbo en 1997 kaj al ĝi oni alligis apudajn kamparajn komunumojn. Nun la loĝantaro de

Porvoo nombras 44 700 homojn, el kiuj triono havas la svedan kiel sian gepatran lingvon. La sveda nomo de la urbo estas Borgå (el *borg* fortikaĵo kaj *å* rivero, do „fortikaĵo riverborda”). La blua urba blazono surhavas arĝentan literon C, devenantan de la latinaj vortoj *castrum*, *castellum* (kastelo).

La urban ĉarmon atribuas malnovaj lignodomaj kvartaloj, kie la stratetoj estas mallargaj, bulŝtone pavimitaj, borde-ritaj de ĉiuspecaj butiketoj kaj kafejoj. Do, surmetu viajn plej komfortajn ŝuojn por promenado kaj nepre piediru. Tie situas la malgranda ŝtona preĝejo, en kiu la Dieto kunsidis, kaj la hejmo-muzeo de la nacia poeto de Finnlando, Johan Ludvig Runeberg (1804–1877). Ĉi-las- ta aspektas kiel en la 19a jarcento, kun maljunaj verdaj plantoj kaj mebloj de sia epoko. En la urbo troveblas ankaŭ pluraj aliaj muzeetoj, artaj ekspozicioj, statuoj, ĝardenetoj. En la malnova kvartalo nuntempe loĝas 700 privatuloj.

Caro Nikolao la 2a (1868–1918) ne ŝatis la svedan aspekton de la urbo. Por la konstruitaj domoj li favoris empiron, kaj li fondis novan urboparton sude de la malnova. Inter tiuj du partoj troviĝas la nuna centro de la urbo: modernaj magazenoj, aŭtobusa stacio, foira placo, oficejoj de firmaoj.

Porvoo disponigas haveneton al vizitantaj privataj ŝipoj kaj boatoj. Sur la apuda insularo loĝas trimilo da homoj, kaj troviĝas dekmilo da feriodomoj. Ne nur ŝipe oni povas ekkoni la insularon, sed ankaŭ aŭte kaj buse danke al duoninsuloj kaj pontoj. Turisma firmao *Porvoo tours* proponas siajn servojn en 13 lingvoj, inter ili la ĉina, ĉeĥa, dana, estona, franca, germana, hungara, rusa. Duono de la turistoj vizitantaj Porvoon estas eksterlandanoj. La urbo mem publikigis sian gvidlibreton en pluraj lingvoj. Reto: www.porvootours.fi, www.porvoo.fi/matkailu.

SALIKO



Strateto en la malnova urbo.

Modelo de interreligia harmonieco



Moskeo kaj preĝejo apude en la urbo Ferizaj.



Ekde la fervoja stacio oni vidas la moskeon pro la minaretoj.

Antaŭ nelonge respondeculo de la Eŭropa Komisiono deklaris, ke la albanoj, enirante Eŭropan Union, alportos almenaŭ du trezoraĵojn: gastemecon kaj interreligian solidarecon. La gastemo estas jam sankciita ankaŭ en la praa mor-kodo albana (la tiel nomata *Kanuni i Lekë Dukagjinit* aŭ „Kanono – leĝaro – de Lek Dukaĝini”, princo el la 15a jarcento), kie oni substrekas, ke „la hejmo de la albano estas samtempe la hejmo de Dio kaj la gasto”.¹ Kaj interreligia harmonieco kaj solidareco estas jam konata en ĉiuj teritorioj kie loĝas amase sur sia propra teritorio albanaj etnuloj (nome en Albanio, Kosovo, suda Serbio, okcidenta Makedonio, suda Montenegro, norda Grekio).

Historie neniam okazis fortaj kvereloj kaj malpaciĝoj inter islamanoj, katolikoj kaj ortodoksaj kristanoj en tiuj teritorioj.

Ĉe albanoj la islamanoj, en la lastaj jarcentoj, konsistigas la plimulton de la loĝantaro. (Respektive en Albanio 70 %, en Kosovo 90 %, en okcidenta Makedonio 95 %, en suda Montenegro 90 %, en suda Serbio 80 %, sed nur malplimulte en norda Grekio).

Historie neniam okazis fortaj kvereloj kaj malpaciĝoj inter islamanoj, katolikoj kaj ortodoksaj kristanoj en tiuj teritorioj, eĉ dum la grandaj tutmondaj krizoj (ambaŭ mondmilitoj ekzemple). Izolitaj incidentoj, kiuj okazis en Kosovo dum



BARDHYL SELIMI

la lasta tiea milito, laŭdire tute ne koncernas la albanan popolon, sed nur ŝtelistojn kaj krimulojn, kiuj deziris profiti el la ĥaoso.

Lastatempe mi vizitis denove Kosovon kaj speciale la urbon Ferizaj, en kies centro staras du malsamreligiaj monumentoj, unu granda moskeo kun du minaretoj kaj unu belega ortodoksa preĝejo, ambaŭ restaŭritaj lastatempe. Ambaŭ konstruaĵoj situas en la sama kortego, unu apud la alia, kaj la kredantoj de ambaŭ religioj eniras senprobleme en la saman korton por preĝi al Dio en siaj malsamaj sanktejoj. Tio efektive jam daŭras jarcentojn kaj same okazas hodiaŭ.

Bardhyl SELIMI

¹ Kritikantoj atentigas, ke tiu malnova leĝaro sankcias ankaŭ sangnan venĝon. (Noto de la redaktoro.)



BARDHYL SELIMI

Ambaŭ konstruaĵoj situas en la sama kortego, unu apud la alia.

KUBO

Frato José Olallo Valdés beata

La 29an de novembro 2008, per amasa, solena ceremonio, oni proklamis beata fraton José Olallo Valdés [hóse olajo valdés] de la ordeno Hospitalana de Sankta Johano de Dio. Kvankam ja temis pri la unua tia ceremonio en Kubo, frato Olallo (pro sia bonkoreco de ĉiuj nomata „Patro”, kvankam li neniam pastrigis) ne estis la unua kuba beatulo, ĉar la 28an de oktobro 2007 oni jam proklamis, sed en Romo, beata fraton José López Piteira [hóse lopes pitejra], unu el la 498 martiroj murditaj dum la civila milito en Hispanio. La eraro estas certe pardoninda, des pli ke nur lastatempe oni komencis pli ofte pritrakti tiajn aferojn ĵurnale.

Frato Olallo estis ricevita la 15an de

marto 1820 en la orfejo Sankta Jozefo en Havano. Nenion oni scias pri la gepatroj: paperslipo trovita apud la bebo nur tekstis: „Li naskiĝis la lastan 12an de februaro kaj ne estas baptita.” La familinomon Valdés li ricevis memore al la episkopo Jerónimo [herónimo] Valdés, fondinto de la orfejo.

Dum preskaŭ 54 jaroj, ekde 1835, kiam furiozis ĥolera epidemio, frato Olallo dediĉis sin al flegado de malsanuloj kaj malriĉuloj en la hospitalo de la komunumo hospitalana en la nuna urbo Camagüey [kamagŭej]. Dum la malsukcesa dekjara sendependiga milito (1868-1878) la frato, kiun ĉiuj opiniis sanktulo, prizorgis vunditojn el ambaŭ armeoj, kaj iufoje evitis amasan murdodon de civil-

uloj. Krome, li riskis sian vivon, kiam li zorgis kaj lavis la kadavron de la fama ribelulo Ignacio Agramonte, forĵetita surstrate de la koloniaj militistoj. Je lia morto la 17an de marto 1889 la tuta urbo marŝis procesie post la ĉerko, kaj per publika monkollektado oni starigis memorigan monumenton. Ankaŭ lian nomon portas kaj placo kaj strato.

Fraton Olallo oni agnoskas beatulo pro la mirakla resanigo de la infano Daniela Cabrera Ramos, suferinta pri kancero kaj renaj problemoj.

La solenan ceremonion, tiunokte elsenditan de la tutlanda televidkanalo 15, ĉeestis, krom la kuba episkoparo kaj help episkopoj amaso da fiduloj.

Alberto GARCÍA FUMERO



Dum preskaŭ 54 jaroj, ekde 1835, kiam furiozis ĥolera epidemio, frato Olallo dediĉis sin al flegado de malsanuloj kaj malriĉuloj en la hospitalo de la komunumo hospitalana en la nuna urbo Camagüey.

Vatikano diplomatie rilatas kun 177 landoj

ARNDI

Okaze de renkontiĝo de la diplomataro akreditita ĉe la Sankta Seĝo (kiu sidas en Vatikano) por novjara bondeziro al la papo, aperis en diversaj ĵurnaloj priskriboj pri la stato de la internaciaj rilatoj de la centro de la katolika eklezio. La unua kaj unika fonto estis la vatikana gazetara agentejo *Fides*.

En la lastaj jardekoj la diplomataro reto de la Sankta Seĝo rimarkinde pliampleksiĝis. Dum la papado de Johano Paŭlo la 2a la nombro de la landoj, kun kiuj la Sankta Seĝo subtenas plenajn diplomatajn rilatojn, pli ol duobliĝis. En 1978 ili estis 84, ĉe la fino de lia papado la nombro kreskis ĝis 174. Dum la papado de Benedikto la 16a aldoniĝis aliaj tri: la ĵus sendependiĝinta Montenegro en 2006, la Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj en 2007 kaj Bocvano en 2008.

Hodiaŭ, do, estas 177, al kiuj aldonendas la Rusia Federacio, kun kiu establiĝis diplomataj rilatoj je speciala naturo. La Sankta Seĝo, krome, diplomatie rilatas kun Eŭropa Unio kaj la Suverena Milita Ordeno de Malto kaj rajtigite konservas siajn oficialajn konstantajn observantojn ĉe la plej gravaj

internaciaj registaraj organizaĵoj, kiel ekzemple UN en Nov-Jorko kaj Ĝenevo, Nutraĵa kaj Agrokultura Organizaĵo, Monda Organizaĵo pri Komerco, Araba Ligo kaj Afrika Unio. Unika kazo koncernas Tajvanon, kie la Sankta Seĝo ekde 1979 reprezentigas ne de nuncio, sed nur de simpla „aferŝarĝito *ad interim*” (portempa). Kaj tio en la atendo povi fine malfermi nunciejon en Pekino.

La Sankta Seĝo diplomatie ankoraŭ ne kunparolas kun 16 landoj. En naŭ el tiuj ĉeestas neniu vatikana sendito, nome en Afganio, Saŭda Arabio, Nord-Koreio, Butano, Popola Ĉinio, Maldivoj, Omano, Tuvalo kaj Vjetnamio. Agadas apostolaj delegitoj (papaj reprezentantoj ĉe lokaj katolikaj komunumoj, ne ĉe la tiulanda registaro) en aliaj sep landoj: tri en Afriko (Komoroj, Maŭritanio kaj Somalio) kaj kvar en Azio (Brunejo, Laoso, Malajzio kaj Birmo). Kun kelkaj el tiuj 16 landoj ne mankas kontaktoj, oficialaj kaj konfidencaj, ankaŭ je plej alta nivelo. En novembro 2007, ekzemple, la papo akceptis en historia aŭdienco la saŭdan reĝon Abdullah, dum en la antaŭa aprilo delegacio de Popola Ĉinio havis interparoladon en Vatikano kun

ties reprezentantoj. Estas sciata krome, ke Afganio kaj Somalio konfidence montris deziron diplomatie ekrilati kun la Sankta Seĝo; Vjetnamio publike sciigis sian volon atingi la samon, dum la vatikana diplomatio laboras por krei tiajn rilatojn kun Omano. Kun Kosovo la antaŭtraktadoj ankoraŭ stagnas, ĉar eĉ se tiu lando jam akiris rekonon fare de multaj ŝtatoj, inter kiuj tamen ne ĉiuj de Eŭropa Unio, la Sankta Seĝo preferas ne riski perturbi la nunan trankvilecon inter la balkanaj ŝtatoj.

Proksimume duono de la landoj, kiuj diplomatie rilatas kun la Sankta Seĝo, havas sian propran ambasadejon en Romo, malsaman ol tiu ĉe *Quirinale* (= Kvirinalo, la sidejo de la itala prezidanto); la ceteraj male estas reprezentataj de delegitoj loĝantaj en sia lando aŭ en ambasadejo ĉe alia eŭropa lando. Kiel dojeno de tiu diplomataro funkcias vice la plej longserva akreditita ambasadoro en Romo. Ekde marto 2008 tiu tasko estas plenumata de Alejandro Emilio Valladares Lanza, la ambasadoro de Honduro de post 1991.

Armando ZECCHIN

La Pendantaj Ĝardenoj estis sonĝo

*Trankviliĝu, la Pendantaj Ĝardenoj estis sonĝo ...
vian animon amas kaj nutras la erar'.*

(Trumbull Stickney, usona poeto)

Lir Torran malpakis la lastan el la kestoj, en kiuj alvenis lia posedaĵo, malfermis botelon da biero, eksidis kaj kontente suspiris. Finfine, li povis iom ripozi post la translokiĝo al sia nova domo. Sed li apenaŭ havis tempon por trinki unu plenbuŝon, kiam li aŭdis la pordan sonorilon. Malvolonte li leviĝis kaj iris al la enirejo. Viro kaj virino staris sur la sojlo. La virino ridetis.

„Bonan tagon!” ŝi diris angle. „Kredeble vi estas nia nova najbaro. Ni loĝas en la apuda domo. Sara kaj Johano Bartlett.”

Lir klinis la kapon. „Lir Torran. Bonvolu eniri. Mi ĵus alvenis al la urbo.”

La paro eniris en la malplenan salondon.

Lir grimacis. „Mi pardonpetas pro la malordo. Mia meblaro ankoraŭ estas en la remizo. Mi povas nur inviti vin eksidi sur la lignaj kestoj.”

„Ne gravas”, diris la viro, kiu ĝis tiam ne parolis.

Lir prenis du glasojn, kiuj staris sur fenestrobreto. „Ĉu mi povas proponi al vi glason da biero?”

„Dankon”, diris Bartlett. „Alkoholaĵon ni ne trinkas.”

„Ne”, diris lia edzino. „Certe, vi estas tre okupita. Ni ne volis interrompi – nur bonvenigi vin al nia najbareco – kaj dividi kun vi bonan novaĵon.”

Lir estis iom perpleksigita. „Bonan novaĵon?”

La virino afable ridetis. „De Dio, nia Sinjoro. El la Biblio. En ĝi vi legos,

ke Dio amas vin – vere bona novaĵo. La vorto ‘evangelio’ signifas bonan novaĵon. Ĉu vi havas ekzempleron de la Biblio?” Ŝi ĉirkaŭrigardis la salondon.

„Le mi havas versiojn en diversaj naciaj kaj plan-lingvoj. Mi uzas ilin por kompari la lingvaĵojn. La interlingvistiko estas unu el miaj interesoj.”

La virino skuis la kapon.

**„Ne, vi devus legi
la Sanktan Skribon
en la angla versio,
rajtigita de la reĝo Jakobo.
Tiu estas la sola fidinda.**

La virino skuis la kapon. „Ne, vi devus legi la Sanktan Skribon en la angla versio, rajtigita de la reĝo Jakobo. Tiu estas la sola fidinda. Niaj misiistoj uzas tradukojn por enkonduki indiĝenojn al la fido, sed poste ili ĉiam instruas la anglan lingvon al siaj konvertitoj, por ke ili progresu en la religio. Ni estas konvinkitaj, ke Dio elektis la anglalingvajn popolojn por disvastigi la evangelion kaj enkonduki la demokration al nekristanoj.”

„Fulmotondro”, pensis Lir. „Kio komenciĝas ĉi tie? Tian renkontiĝon mi ne bezonis.” „Vi devas pardoni min. Mi ankoraŭ havas multon por fari. Sed estis plezuro konatiĝi kun vi.”

„Kompreneble”, respondis la virino.

„En pli taŭga okazo ni havos tempon por konversacii.” La paro ekstaris kaj paŝis al la enirpordo. „Intertempe, ni adiaŭas. Ĝis revido.”

Kiam ili estis for, Lir peze suspiris.

En la vespero li veturis al la flughaveno, kie li atendis la alvenon de la aviadilo portanta de Parizo lian edzinon Mariela. Survoje hejmen kun ŝi li menciis, ke li jam ricevis viziton de iliaj novaj najbaroj, la paro Bartlett.

„Kaj?” demandis Mariela.

„Iom nekutima paro. Ili volis paroli nur pri la Biblio.”

„Tiaj homoj ne estas nekutimaj. En nia lasta hejmo ni konstante estis vizitataj de Mormonoj, Atestantoj de Jehovo, la Legio de Maria kaj tiel plu, kaj tiel plu ...”

„Vi pravas. Senofendaj, sed iom ĝenaj piuloj. Almenaŭ ili ne volis vendi al ni asekuron aŭ enciklopedion. Kaj sendube ilia intenco estis amika. Ili bonvenigis nin al la najbareco.”

„Do, ne tro plendu.”

* * *

En la sekva tago Mariela senŝeligis terpomon, kiam refoje aperis ĉe la pordo sinjorino Bartlett. Lir laboris, do Marie-la estis sola en la domo, krom la hundo Persiflaĝo. Ŝi kondukis Saran Bartlett al la salono, invitis ŝin sidiĝi kaj regalis ŝin per taso da kafo. Dum kafotrinkado ili konversaciis.

Sara afable ridetis. „Por ni estis granda plezuro konatiĝi kun via ĉarma edzo. Kiel ni, li evidente tre interesiĝas

pri la Biblio.”

Mariela estis surprizita. „Ĉu?”

La najbarino ĉirkaŭrigardis la salonon kaj rimarkis, ke ekzemplero de la *Astronomia Revuo* kuŝis sur la tablo. „Astronomio – espereble ne astrologio!”

„Mia edzo interesiĝas pri astronomio, sed nur kiel amato. Astronomio estas scienco. Astrologio estas nura superstiĉo.”

Sara grimacetas. „Vi pravas. Sed ankaŭ tiel nomata scienco ofte estas nura superstiĉo. La universo ne estas tiom vasta, ke oni devas mezuri ĝin laŭ lumjaraj dimensioj, kaj la mondo ne estas tiom antikva, kiom la scienculoj asertas.”

„Ĉu? Tiel vi opinias?”

„Certe. La scienculoj pretendas, ke ĝi estiĝis antaŭ milionoj da jaroj sen ago de la Kreinto. Ni scias, ke tio ne estas vera. La irlanda episkopo Jakobo Ussher pruvis en la dek-sepa jarcento, ke la kreado okazis en la jaro 4004 antaŭ Kristo.”

„Kiel li povis konstati tion?”

„Li kalkulis tion laŭ la aĝoj de la homoj enlistigitaj en la genealogioj en la Malnova Testamento. Sed hodiaŭ multaj personoj ne kredas, ke Dio kreis la mondon kaj ĉiujn estaĵojn en ĝi. Ili preferas kredi al la darvina teorio pri evoluo, kiu estas pura mensogo.”

„Se ĝi estas teorio, ĝi ne povas samtempe esti mensogo. Ĉu teorio ne estas provizora supozo aŭ hipotezo? Kaj ŝajnas al mi, ke la doktrino pri la origino de specioj estas akceptita de ĉiuj scienculoj.”

„Aj, Mariela – ĉu mi rajtas nomi vin Mariela? – Vi estas profunde erarigita.”

„Nun en la plimulto de la angleparolantaj landoj la plej saĝaj scienculoj kredas ne al la evoluo, sed al la kreismo. En pluraj ŝtatoj estas malpermesite instrui infanojn pri evoluo, kaj lernejoj kaj universitatoj estas devigataj kontraŭpasi instruadon pri evoluo per instruoj pri kreismo. Multaj politikistoj apogas tion.”

Mariela suspiris. „Por mi tiaj aferoj estas iom komplikaj. Ĉu ni trinku teon kaj parolu pri io alia?”

* * *

Mariela ĵus eliris el la supervendejo, kiam ŝi refoje renkontis la najbarinon. Sara invitis ŝin trinki teon kaj iom ripozi en apuda kafejo antaŭ ol reiri hejmen.

„Doloras la piedoj post aĉetado kaj starado en vico, ĉu ne?”

Mariela ne tro entuziasmiĝis pri la perspektivo reaŭdi la bigotajn opiniojn de Sara, sed ĉar ŝi estis ĝentila virino, ŝi cedis.

„Ĉu vi hodiaŭ legis la ĵurnalon – pri brutala atako kontraŭ infano en la urba parko?” demandis Sara, post kiam ili sidiĝis en la kafejo.

Mariela neis. „Ĉi-matene mi ne havis okazon legi la novaĵojn.”

„Terura afero!”

Mariela grimacis. „Hodiaŭ estas malfacile protekti la infanojn kontraŭ danĝero.”

Sara memkontente ridetis. „Feliĉe, kiam niaj infanoj estis junaj, ni ĉiam instruis ilin, ke ili ne bezonas timi danĝerojn aŭ maliculojn, ĉar ĉiu kristana infano havas gardanĝelon.”

Mariela malaprobis. „Ŝajnas al mi eĉ pli danĝere kredigi la infanojn, ke ili estas protektataj de gardanĝeloj. Tio lasas ilin vere vundeblaj kaj sen protekto.”

„Ho, malgrandfidulino!” kriegis Sara. „En la unua ĉapitro de la Epistolo al la Hebreoj ni legas: ‘Ĉu ne estas ili ĉiuj spiritoj servantaj, elsendataj, por servi al tiuj, kiuj estas heredontoj de la savo?’”

Mariela suspiris. „Ĉu vi pensas, ke miloj da teneraj infanoj kaj kompatindaj mizeruloj ne vokadis en aflikto al siaj gardanĝeloj, sen ricevi respondon aŭ protekton? Kio pri la milionoj da senkulpuloj, kiuj suferis kaj mortis en koncentrejoj? Ĉu vi ne kredas, ke ili preĝis kaj petis, sed tute vane? Estas malrespondece kaj kruele doni falsan senton de sekureco, kiam tia sekureco ne ekzistas?”

Sara kapneis. „Vi ne komprenas la misteron de la fido. Al la profeto Jesaja diris Dio: ‘Miaj pensoj ne estas viaj pensoj, kaj viaj vojoj ne estas Miaj vojoj.’ Antaŭ kelkaj jaroj juna knabino, la filino de sinjorino Martin, estis murdita en la urbo. Mi ĉeestis la funebran solenaĵon, kaj ĉe la enterigo mi iris por kondolenci ŝin. Mi certigis ŝin, ke la morto de la etulo estas la volo de Dio, ŝi tre konsoliĝis.”

Mariela estis ŝokita. „Ĉu vi pensas, ke tio estas konsolo? Certe temas ne pri la volo de Dio, sed pri la volo de la brutala ulo, kiu mortigis la infanon ...”

Indignita, ŝi adiaŭis Saran kaj rapide foriris al la aŭtobushaltejo.

* * *

Iun sabaton Lir, kiu promenis kun sia hundo, renkontis Johanon Bartlett apud la golfejo. Bartlett salutis. „Bone, ke ni



WADE FROM OKLAHOMA

Ĉu ni trinku teon kaj parolu pri io alia?

renkontiĝis! Mi deziras inviti vin al la dimanĉa diservo en nia preĝejo. Nia pas-toro intencas prediki pri la potenco de la preĝo – tre grava temo.”

„Mi dankas vin pro la invito, sed mi devas rifuzi. Mi estas katoliko – aŭ almenaŭ miaj gepatroj donis al mi ka-tolikan edukadon. Mi konfesas, ke mi tute ne estas pia, kaj mi havas miajn personajn dubojn pri la preĝo. Kiam mi estis juna, oni instruis min, ke mi de-vas preĝi, sed post jaroj mi venis al la konkludo, ke neniuj aŭskultas, ĉar neniuj respondis. Se mi telefonas al iu ajn, kaj post longa tempo mi ne ricevas respon-don, mi rezignas pri la telefonado. Same pri preĝado.”

„Vi eraras”, protestis Johano.

„Aŭskultu – se iu el via familio – diru via filo – estus surveturita kaj se-riozie vundita, kion vi farus?”

„Kompreneble mi preĝus, ke li resaniĝu.”

„Kaj se oni devus amputi al li la krurojn?”

„Do mi dankus al Dio, ke li povos vivi pli-malpli normale, eĉ en rulseĝo.”

„Kaj se li estus mense difektita aŭ en komato?”

„En tiu okazo mi dankus Dion, ke lia korpo ne estas difektita.”

„Kaj se li estus mortinta?”

„Mi estus dankema, ke li ne plu su-feras kaj estas en la ĉielo.”

„Do, en iu ajn okazo vi estus danka? Kvankam via preĝo ne ricevis respon-don?”

„Sed mi ja ricevis respondon!”

„Kian?”

„La respondon ‘Ne’. Ankaŭ tio estas respondo.”

„Silento ne estas respondo. Johano, ni devas interkonsenti, ke vi kaj mi tute malsame pensas. Mi bezonas ian fortan trinkaĵon. Ĉu vi akompanas?”

„En trinkejon? Neniam. Mi devas ra-pidi al nia semajna preĝkunveno.”

Johano forkuris, lasante Lir sola kun la hundo.

* * *

Lir sidis en la kantino de sia nova laborejo, trinkante kafon kun grupo da siaj novaj kolegoj. Unu post alia ili pre-

zentis sin al Lir, kiu nur en la antaŭtago komencis labori en la esplor- kaj disvol-vofako de la fabriko. La kolegaro konsi-stis el Georgo, subĉefo de la fako; Petro, kontisto; kaj Johano, desegnisto. Ĝis tiam Lir ne sciis, ke Bartlett laboras en la sama laborejo, kiel li. Kiam Lir unu-afoje eniris en la kantinon, Petro kaj Jo-hano parolis kune pri religio, kiu ŝajnis al Lir iom stranga temo por diskuti dum laborhoroj. Johano klarigis, ke antaŭ ol iĝi kontisto Petro estis romkatolika se-minariano, kaj ili ŝatas interŝanĝi ideojn pri siaj respektivaj religioj ... Johano estis membro de rigora evangelia sek-to, la Ĉiela Paroĥo de la Eklezio de la Elaĉetinto. Georgo senpacienciĝis, di-rante, ke li preferas diskuti sporton, kaj forlasis la salonon.

Sara memkontente ridetis.

„Feliĉe, kiam niaj infanoj estis junaj, ni ĉiam instruis ilin, ke ili ne bezonas timi danĝerojn aŭ maliculojn, ĉar ĉiu kristana infano havas gardanĝelon.”

Mariela malaprobis.

„Ŝajnas al mi eĉ pli danĝere kredigi la infanojn, ke ili estas protektataj de gardanĝeloj. Tio lasas ilin vere vundeblaj kaj sen protekto.”

Lir ne tro interesiĝis pri la konvers-acio kaj ankaŭ preferis paroli pri sporto, sed ne volis montri sin malĝentila.

„Jes”, diris Petro. „Mia patrino es-tas tre pia kaj deziris, ke mi estu pastro. Poste mi konstatis, ke mi ne estis preta por la deviga fraŭla vivo – mi tro amas la virinojn.”

Johano kuntiris la brovojn. „La Bi-blio avertas nin kontraŭ tro da inklino al la virinoj. Finfine estis virino, kiu unua tentis la viron kaj enkondukis pekon en la mondon. Antaŭ la malobeco de Eva Adamo povis promeni en la ĝardeno kun Dio kaj paroli rekte kun li.”

Petro ridis. „Ĉu vi laŭvorte kredis je la Biblio?”

„Kompreneble”, insistis Johano. „Ĝi estas la vorto de Dio!”

Lir skuis la kapon. „Bizara konvers-

acio. Oni eĉ ne sukcesis pruvi, ke iu dio ekzistas.”

„Kiam mi estis studento pri teolo-gio,” diris Petro, „ni studis la tradiciajn argumentojn pruvantajn la ekziston de Dio: la kosmologian, la moralan, la on-tologian ktp.”

Lir diris, ke li legis pri tiuj argumen-toj. Johano asertis, ke li ne nur konas ilin, sed estas konvinkita, ke ili estas ne-refuteblaj.

Lir kapneis. „Kiam mi estis studen-to, ni studis logikon, kaj ĉiuj el tiuj argu-mentoĵoj estas bazitaj sur paralogsimo.”

„Sur kio?” demandis Johano.

„Falsa silogsimo. Valida silogsimo devas esti formulita laŭ la modelo: ‘Se X validas, do ankaŭ Y; X validas; do Y’. Sed tiuj tiel nomataj pruvoj argumentas

jene: ‘Se X validas, do ankaŭ Y; Y vali-das; do X’, kio estas stultaĵo. En la latina lingvo oni nomas tion *petitio principii*.”

Johano indignis. „Ĉu vi, do, ne kre-das je Dio?”

„Tio ne estas valida demando. En matematiko oni uzas la literon X por indiki nekonatan valoron. La koncepto ‘Dio’ estas simila al ikso. Sen scii, kiu estas la enhavo, aŭ la valoro, de la ter-mo, ni ne povas doni respondon al la demando.”

„Sufiĉas!” kriegis Petro. „Ni devas reiri al la laboro!”

* * *

Dum vespermanĝo Lir kaj Mariela parolis pri la okazaĵoj de la tago. Marie-la esprimis surprizon, kiam ŝi aŭdis, ke ilia najbaro Bartlett laboras en la sama loko kiel ŝia edzo.

„Ne tiom surprize”, respondis Lir. „La urbo estas malgranda, kaj preskaŭ ĉiuj loĝantoj, krom la butikistoj kaj la bienistoj, estas dungitoj de la sama entrepreno. Sed kelkaj el miaj kolegoj estas ege bizaraj – precipe Bartlett. Li volas paroli nur pri sia kredo.”

„Ankaŭ lia edzino”, diris Mariela. „Hodiaŭ ni parolis trans la heĝo, kiam ni ambaŭ estis en la ĝardeno, kaj ŝi informis min, ke ŝi kondukas kampanjon inter la najbaraj familioj, por ke ili ne permesu, ke iliaj infanoj legu la romanojn pri Harry Potter.”

„Kiajn romanojn? Pri kio vi parolas?”

„Temas pri serio da infanromanoj de angla verkistino. Ili nuntempe furo-ras en la tuta mondo – fantastaj rakontoj pri lernejo por instrui junajn sorĉistojn. Sinjorino Bartlett opinias, ke tia literaturo pri sorĉistoj instigos la infanojn interesiĝi pri nigra magio, okultismo kaj satanismo. Laŭŝajne, en la angleparolantaj landoj multaj piuloj rigardas la aŭtorinon kiel ilon de la diablo. En la preĝejo de gesinjoroj Bartlett la pastoro ne permesas, ke gepatroj legu fabelojn al la infanoj. Li eĉ kondamnas ĉiujn specojn de fikcio, dirante, ke fikcio estas mensogo, kaj la dia leĝo ne permesas, ke oni mensogu.”

„Kion vi respondis?”

„Mi diris, ke mi supozis, ke klerigitaj homoj ne plu kredas je la diablo – ke tiaj superstiĉoj apartenas al la pasinteco, kiel kredo pri feinoj, koboldoj, la malic-okulo kaj envulto. Poste ŝi asertis, ke la diablo vere ekzistas, kaj ke ŝi ofte aŭdas la voĉon de la diablo flustranta en ŝian orelon kaj provanta tenti ŝin. Ŝi diris, ke se homoj ne plu kredas je la diablo, ili ankaŭ ne plu kredas je Dio, kaj pri tiu perdo de fido kulpas la scienculoj. Ŝi kredas, ke la scienco estas la malamiko de la religio.”

„Iom ekstreme, ĉu?”

„Vere. Se mi hodiaŭ aŭskultis radioprogramon, en kiu oni raportis, ke en kelkaj lernejoj kaj universitatoj sub konservativa religia influo oni nun apenaŭ povas rekte instrui geologion, astronomion aŭ paleontologion. Se simile

obskurantoj iam superregos en la ŝtataj registaroj, tio estos mort-bato por la disvolvo de la scienco.”

„En pluraj lokoj ili jam superregas.”

„Kia speco da homo malakceptas la eltrovaĵojn de la scienco, kredas fervore je la plej ekstrema formo de religio kaj samtempe volas detrui la ĉarman fabelan mondon de la etuloj?”

Lir ridetis. „Venas al mi en la kapon kelkaj versoj de iu poeto – mi forgesis, pri kiu temas. Li skribis: ‘Kaj sur la belon ĉi termitoj nigraj / Kakas, kaj ĉirkaŭ miron volvas muron / De kotobrikaj. Vilaj brakoj ograj / Sklave policas la antik-

van moron.’”

„Nu, kara, ĉu ni iru al la ĝardeno trinkejo de la Kortega Hotelo kaj sekvu la antikvan moron trinki glaseton da bona vino?”

„Kial ne? – Kaj parenteze, la poeto nomiĝis Vilhelmo Auld. Li tradukis versaĵojn de Omar Kajam pri vino kaj ĝardeno: ‘Iram’ kun sia rozo jam mallestas / Sepringa taso de Jamŝid fornestas; / Sed vito plu rubenan sian donas / Apudrivere plu ĝarden’ majestas.’”

„Do, venu, fornestu ni!”

Albisturo KVINKE



„Nu, kara, ĉu ni iru al la ĝardeno trinkejo de la Kortega Hotelo kaj sekvu la antikvan moron trinki glaseton da bona vino?”

Iom da historio kaj iom da fiziko

Bazopilko estas tre populara en Usono, sed ĝi estas ludata en multaj landoj. „Besuboru” jam prosperis dum ĉirkaŭ jarcento en Japanio kaj la „homu ran” estas tiom parto de la japana kulturo, kiom sumo-luktado, kabuko kaj suŝio. Bazopilko estas ankaŭ tre populara en la pacifik-randaj orient-aziaj landoj, en Kanado kaj en Kubo, Domingo kaj la kariba regiono.

Sendependa institucio

Bazopilko, kiel Usono mem, evoluis el brita antaŭaĵo en unikan kaj sendependan institucion. La origino de bazopilko venis de neformala formo de la angla sporto kriketo nomata „rondkuro”, kiu estis ludata en la nord-amerikaj kolonioj jam en la mezo de la 18a jarcento. La ludo jam estis nomata „bazopilko” en libro por infanoj en 1744.

Usonanoj ekludis bazopilkon per neformalaj ludantaroj, uzante lokajn regulojn, en la frua 19a jarcento. Dum la 1860aj jaroj la sporto, senrivala je populareco, jam estis vortpentrita kiel la „nacia distraĵo” de Usono.

Alexander Joy Cartwright [Aleksander Ĝoj Kartrajt] (1820–1892) el Nov-Jorko inventis la modernan bazopilkon kampon en 1845. Li kaj la anoj de lia Novjorka Knikerboka Bazopilka Klubo elpensis la unuajn regularojn por la moderna ludo de bazopilko.

La unua registrita bazopilka ludo okazis en 1846, kiam ĉi tiu ludantaro malgajnis kontraŭ la Novjorka Naŭopa Bazopilka Klubo. La ludo okazis ĉe Elsie's Fields en Hoboken, Nov-Jerzejo. En 1858 la Nacia Asocio de Ludantoj de Bazopilko formiĝis. En 1869 la Cincinnati Ruĝ-Ŝtrumpoj fariĝis la unua malkaŝe



La unua registrita bazopilka ludo okazis en 1846.

salajrata bazopilka ludantaro. En 1871 la unua profesia bazopilka ligo, la Nacia Asocio de Profesiaj Bazopilkaj Ludantoj, establiĝis. En 1876 la unua ĉefa ligo, la Nacia Ligo, formiĝis. En 1878 Frederick Winthrop Thayer [Fredrik Ŭintrop Tejer] de Masaĉuseco, kapitano de la bazopilka klubo de Universitato Harvard, ricevis patenton por bazopilka kaptanto-masko. En 1884 la unua Bazopilka Mond-Serio estis ludata.

Iom da fiziko

La ĵetanto staras malpli ol 20 metrojn for de la batanto kaj ĵetas la pilkon je rapido de proksimume 40 metroj en sekundo. Dum sia flugo la pilko falas el sia „rekt-linia” vojo je proksimume 1,2 metroj. Aldone, pro la kudraĵoj sur la pilko estas konsiderinda aer-tumulto, kiu tuŝas ĝin kaj ŝanĝas ĝian vojon kaj vertikale kaj horizontale. Por pligrandigi ĉi tiun efikon la ĵetanto ofte aldonas ekstran turniĝon al la pilko. La pilko do kutime faras proksimume 20 rotaciojn dum sia vojo. Pro tio la pilko povas moviĝi ĝis 44 centimetrojn horizontale el sia „rekt-linia” vojo. Kaj

la pilko faras la plimulton de sia horizontala moviĝo dum la lasta kvarono de la vojo! Oni ankaŭ konsideru, ke la pilko bezonas malpli da tempo por trairi tiun kvaronan vojon (proksimume 1/6 da sekundo) ol la batanto bezonas por antaŭen-svingi la batilon (proksimume 1/5 da sekundo). La batanto do devas komenci sian antaŭen-svingon antaŭ ol la pilko komencas montri multan horizontalan moviĝon.

Se la batanto mistaksas la rapidon de la pilko, lia antaŭen-svingo estos aŭ tro frua aŭ tro malfrua. Kaj se li misjuĝas la alton de la pilko, lia antaŭen-svingo estos aŭ tro alta aŭ tro malalta. Pro tio la batado de bazopilka pilko per la batilo fare de la batanto estas tiel malfacilega!

Unu el la plej bonaj batantoj iam estis Ted Williams. Pri la batado de bazopilka pilko li diris: „La batado estas 50-elcente super la ŝultroj.” Kaj Yogi Berra, unu el la plej amuzaj ludantoj iam diris, „90 % de la bazopilka ludo estas mensaj kaj la alia duono estas fizika!” Ne preambaŭ pravis!

Litera sudoko

La reguloj de ĉi tiu speco de sudoko estas la samaj kiel por la cifera sudoko, nur ke la ciferoj 1 ĝis 9 estas 9 diversaj literoj kaj ke sur la unua horizontala linio griza la litera sinsekvo formas (radik)vorton (aŭ nombron litere skribitan).

Sendu la vorton antaŭ la 1a de septembro 2009 al Flandra Esperanto-Ligo, Monato-enigmoj, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio aŭ rete al enigmoj@monato.net.

Inter la solvintoj Monato elektos tri personojn, kiuj ricevos valoran premion!



MARY MUSES


	L	I		E		A		T
A				G	O		S	
T	N				S		A	
				O		T	N	
S			L			E		
L	I		O					N
	S							G
	T				E	I		

La solvo de la libroforma enigmo de Monato 1/2009

Malmulte da respondoj alvenis por la libroforma enigmo januara.

3 da gajnis la koncernan libreton KATORELO, nome Bruno Lehtinen (Finnlando), Denise Hubert (Francio) kaj Dorota Burchardt (Pollando).

Korajn gratulojn al ĉiuj solvintoj.



anoncetoj

Sur Interreto aperis **La Teorio pri Ĉio**, vivoverko de Manuel Halvelik, je la adreso www.sotragogismo.net. Ĝi estas senpage elŝutebla, sed ege ampleksa.

La **Deklingva manlibro pri politiko** de Stefan Maul helpas vin trovi vian vojon en la politika ĵargono. Mendu ĝin de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio, butiko@fel.esperanto.be kontraŭ 9,50 eŭroj + afranko.

Vizitu Ipernity, la virtualan Esperanto-vilaĝon, kie pli ol 1700 Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.ipernity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelego programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplo. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 lhász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>

Komencanto

"Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj. Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaj humuraĵoj ...

Regule aperas ekde 1998
Formato A4, 16 paĝoj

retpoŝto: komencanto@r66.ru
provizora retpaĝo:
www.komencanto.narod.ru

Poŝta adreso:
KOMENCANTO,
pk 132, Ekaterinburg,
620041 Rusio

Abontarifo: 15 eŭroj
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.
Abonu ĉe UEA aŭ
ĉe via landa peranto



**enciklopedieto
kun informoj kiel
telefoni el kaj al
eksterlando**

POŜKALENDARO

- kun spaco por fari notojn
- kun indiko de la festotagoj en diversaj landoj

ENCIKLOPEDIETO

- kun ŝtatoj de l'mondo
- kun ĉefurboj, loĝantoj ktp.
- kaj multe pli

La Jaro 2010

via poŝamiko dum la tuta jaro 2010



Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen
www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be
aŭ ĉe via Monato-peranto (vidu liston kaj prezojn en p.4)

Certiĝu pri ĝustatempa livero, kaj mendu jam nun
por la 3 venontaj jaroj (-5%) aŭ por la 5 venontaj jaroj (-10%)